

Justinus Kerner,
Eltrinku la vinon

tradukita de Ludwig Emil Meier

Eltrinku la vinon, foriras nun mi;
adiaŭ, karuloj, en hejm' tie ĉi!
Adiaŭ, vi montoj, gepatra tegment',
perforte fortiras min freŝa la vent'.

La suno ne restas ĉe sama stelar',
trans landojn ĝi migras kaj super la mar'.
La ondoj ne haltas ĉe sia la bord',
la ventoj forkuras muĝante kun fort'.

Kun nuboj rapidaj la bird' flugas for,
al landoj tutfremdaj ĝin tiras la kor'.
Kaj tiel junulo migremas sen fin',
simila al tero, al sia patrin'.

Salutas lin sonoj konataj trans mar',
de l'hejm' alfluginta kantanta birdar';
Lin tuŝas de floroj intima odor',
la ventoj patrujaj alblovas ĝin for.

La birdojn li konas el sia hejmland',
la florojn li iam kolektis, amant';
kaj amo lin sekvas, sekreta mister',
lin faras enhejma sur fremda la ter'.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-1030-2090 (2014-05-30 10:37:35)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. La esperantigon de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libreto "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio.